



NOVĴO : VIDU MESAĜON DE JEAN RIPOCHE - *alklaku ĉi tiun ligilon*

Temas pri retmesaĝoj interŝanĝitaj inter esperantistoj kiuj ricevis nian raporton pri IFEF66, ne nur rekte de ni sed ankaŭ de amikoj, fervojistoj aŭ ne, aligintoj aŭ ne, ktp. Ŝajnas ke niaj celoj estos plenumitaj ege pli ol ni antaŭvidis en la komenco. La komunumo de fervojistoj estas aparte vigla!

POR REVIDI LA KOMPLETAN RAPORTON PRI IFEF66 - *alklaku ĉi tiun ligilon*



PgDn

## LA 30AN DE JUNIO 2014 NI SENDIS ĈI TIUN MESAĜON AL LA PARTOPRENINTOJ PRI KIUJ NI HAVAS RETADRESON

(90% de la aliĝintoj havas retadreson: mirinda. Fervojistoj ŝatas novajn teknologiojn ĉu ne?  
Saluton karaj partoprenintoj al IFEF66

Ni estas la geedzoj Hubert De Meyere kaj Michèle Villers el Belgio. Ni plezure sendas al ĉiuj partoprenintoj tiun lumbildstrion pri IFEF66, en kiu ni aldonis raportojn de Vittorio Madella, Liba kaj Floreal Gabalda, kaj la kongres-buletenoj de Jean Ripoché.

Ni dankas la samideanojn kiuj jam helpis nin. Tamen, tio speco de laboro neniam estas finita ĉar ĉiam eblas plibonigi kelkajn aferojn. Plie, ne eblas kontentigi ĉiujn kaj « gustoj kaj koloroj » oni ne diskutas.

**Kelkaj vizaĝoj ankoraŭ mankas en la « Galerio de vizaĝoj ». Se vi havus pli bonajn aŭ mankantajn fotojn, bonvolu sendi ilin al [hubert.demeyere@gmail.com](mailto:hubert.demeyere@gmail.com)**

Ne hezitu sendi proponojn pri korektado de ortografaj aŭ gramatikaj eraroj. La celoj de tiu laboro, krome la plezuro fari ĝin, estas :

- vigligi komunumon de amikoj,
- praktiki nian ŝatatan lingvon.

**Mi plezure legos vian opinion pri la dokumento.**

La dokumento troviĝas sur la retejo de APE kiu estas asocio de esperantistoj el Valonio (franclingve parolanta parto de Belgio). Alklaku la suban ligilon uzante la dekstran klavon de la muso kaj elektu « malfermi en nova fenestro ». Tiel vi malkovros ne nur la raporton pri IFEF66, sed ankaŭ raportojn pri aliaj aranĝoj. Jen la ligilo :

[www.esperanto-wallonie.be](http://www.esperanto-wallonie.be)

Oni pli rekte kapablas aliri la ĉefan dokumenton pri IFEF66 uzante la ĉi suban ligilon (uzu la dekstran klavon de la muso por garantii malfermiĝon de la dosiero en nova fenestro)

[http://www.esperanto-](http://www.esperanto-wallonie.be/sites/default/files/IFEF66_2014_SAN_BENEDETTO_PARTOPRENANTOJ_RAPORTO.pdf)

[wallonie.be/sites/default/files/IFEF66\\_2014\\_SAN\\_BENEDETTO\\_PARTOPRENANTOJ\\_RAPORTO.pdf](http://www.esperanto-wallonie.be/sites/default/files/IFEF66_2014_SAN_BENEDETTO_PARTOPRENANTOJ_RAPORTO.pdf)

La dokumento estas multimedia: tekstoj, bildoj, videoj.

Per la klavoj PgDn PgUp oni kapablas sekvence paĝumi la tutan dokumenton.

Per la provizitaj ligiloj oni facile atingas ĉiujn partojn de la dokumento.

Amike,

Hubert De Meyere (KN 35) kaj Michèle Villers (KN 36)

## NI TUJ RICEVIS AMASON DA POZITIVAJ REAGIOJ.

Tio konfirmas ke ni plenumas niajn celojn, ĉefe kreado de viglan esperantistan komunumon. Mi kopiis kelkajn mesaĝojn aparte afablaj. Ne afablaj ni ne ricevis. Tiu de Patay János el HU-1077 Budapeŝto estas aparte kortuŝa.

**La 1an de Julio**

**KN5 Laurent VIGNAUD Francio skribis tiun mesaĝon.**

**Mi respondas al Laurent blukolore en la teksto.**

Belege, belege, belege !

Karaj,

Grandegan laboron vi faris kaj belegan rezulton atingis. Neniam antaŭe mi vidis tiom belegan kaj kompletan raporton ! Por legi kaj aŭskulti cxion, necesas pli ol unu horon kaj certe multe pli da tempo vi pasigis por tion fari. Do gratulojn kaj gratulegojn al vi !

**Ni kore dankas kaj aprezas vian afablan taksadon.**

Pri mankantaj vizagxoj : plejparte (aŭ tute ?) sxajne temas pri homoj, kiuj ne venis.

**Kiam eblas, ni ankaŭ enmetas la fotojn de tiuj kiuj ne venis, do se vi havas, ilin estas bonvenaj.**

Sur pagxo 99, pri la kanto en akceptejo, la ligilo [http://youtu.be/jVuI\\_Q2XdOM](http://youtu.be/jVuI_Q2XdOM) kondukas al "privata filmo".

**Mi aranĝis tion, kaj nun la video estas publika.**

Krom tio, nur laŭdojn oni povas fari al vi. Kaj do, cxar via raporto estas belega, mi sxatus meti ligilon al gxi komence de pagxeto, kiun mi faris (<<http://ifef.free.fr/IFK2014-SanBenedetto-fotoj.html>>)

**Kompreneble ni plezure permesas tion. Mi jam metis la ligilon en nia raporto.**

sed en <http://www.esperanto-wallonie.be> mi ne trovis ligilon al via pdf-dosiero.

**Ĝi troviĝas sur la ĉefpaĝo « Ĉiutaga menuo » kiu malfermas vicon da paĝoj pri lastaj novaĵoj kiujn oni povas paĝumi per PgDn PgUp klavoj.**

Mi sxatus meti ligilon al via "gxenerala" retejo "[esperanto-wallonie.be](http://www.esperanto-wallonie.be)", klarigante al la homoj "en tiu retejo, alklaku ligilon..." por ke la eventualaj vizitontoj ankaŭ ekhavu ideon viziti vian retejon ! **Bonega ideo. Ekzemple, post la paĝo pri IFEF66, troviĝas ligoj pri la Hispanaj kongresoj pri kiuj mi raportis sammaniere ol pri IFEF66.**

Se mi metas rektan ligilon al via pdf-dosieroj, la homoj elsxutos kaj ne vizitos vian retejon. **Konsentite!**

Sed mi ne trovis... vi eble nur enretigis vian pdf-dosieron, tamen ankoraŭ ne metis ligilon en la retejo... Cxu ?

**Mi metis, sed eble ne sufiĉe klare. Por « enretigi » mi uzas personan ne klasikan agmanieron.**



Per ĉi suba ligilo vi povas legi franclinvajn klarigojn pri tio, sed atentu ke la dokumento ankoraŭ ne estas kompleta.

<http://www.esperanto-wallonie.be/sites/default/files/ORGANISATION.pdf>

Nu, cxiukaze, dankegon... kaj ankaŭ dankegon pro viaj cxiamaj bonhumoraj ridetoj !

Kore, Laurent

**Kara Laurent, mi esperas ke mi ne tedis vin per tiuj mallumaj kaj senrilataj konsideroj pri « enretiĝo ». Tamen se la temo interesas vin, ni povas pli detale pridiskuti la aferon.**

***KN78 Denise HAPPI-FOSSO Francio el Parizo***

Dankon por la belaj fotoj.



***KN125 Renato CORSETTI Italio***

Dankon! Vi faris belegan raporton, kiu montras, kion ebligas la novaj teĥnikoj! Gratulojn!

Renato



***KN53 István SUTKA Hungario***

Karaj Geedzoj Hubert!

Mi tre dankas vian sendaj'on. Tuj mi forsendos g'in al miaj geamikoj.

Elkore mi salutas Vin: Istvan Sutka el vilag'o Kelebia Hungario



***KN64 Liliane KETELERS Belgio***

Dankon Hubert kaj Michèle por via mirinda raporto kaj fotoj , gratulon por la grandega laboron

Amike

Liliane



***90 Zlatko HINŠT Kroatio***

Dankon s-ro Hubert pro sendo de materialoj pri la 66-a IFEF-kongreso.

Gxi estas interesa, unuafoje aperanta.

Elkorajn salutojn Zlatko Hinšt (Kroatio)



## ***KN112 Bijou LOKATO-YEUWA RD Kongo***

Dankon Hubert kaj Michèle. Bedauxrinde mi ne sukcesis akiri la Italan vizon. Se estas alia evento mi do partoprenos. Bijou.

## ***55 Anikò CZIBOLY Hungario***

Saluton!

Mi petas vin bonvolu mian vizagon metu en la vico. Elkore Cziboly Anikó el Budapest



## ***Patay János HU-1077 Budapest***

Altestimataj Gesinjoroj Hubert de Meyere kaj Michèle Villers!

Mi estas János Patay, ekde kvindek jaroj aktiva fervojista esperantisto, ekde 46 jaroj IFEF-membro.

Pere de mia amiko István Sutka mi ricevis vian detalan raporton pri la ĉi-jara, pri la 66-a IFEF-kongreso, okazinte en San Benedetto Trento. De la unua litero ĝis la lasta mi plezure legis viajn rakontojn, informojn, kaj senescepte mi rigardadis la fotojn, spektaklis la video-filmojn.

Antaŭlonge mi regule partoprenis IFEF-kongresojn ĝis kiam mia aĝo kaj sano permesis al mi. Tiuj kongresoj ĉiam donacis min per ĉiurilataj grandaj travivaĵoj, spiritaj/intelektaj trezoroj; ja mi forte al-ligiĝas al la fervojista Esperanto-movado (15 jarojn mi estis komitatano de IFEF, eĉ nun mi kunlaboras la redaktadon de IFEF-bulteno). Kvankam miaj amikoj rakontis pri la tieaj okazintaĵoj, sed via raporto superas ĉion imageblan; ja tro precize vi preparis tiun, ke tio egalas: kvazaŭ mi persone partoprenintus ĉiun programon de la kongreso. (Nur nunusola mankas el mia nuna travivaĵo: la natura voĉo, respondo de miaj geamikoj, kiujn mi „alparolis”, vidinte ilin sur fotoĵoj, filmoj; pri tiu vi ne respondas). Karaj miaj! Kore mi dankas vian donacon, krome mi deziras abundan benon de Dio je via vivo kaj laboro.

Tutkore, via: János Patay.



## ***La 2an de Julio***

### ***KN50 Angel GARCIA-GUTIERREZ Hispanio***

Estimataj amikoj Michèle kaj Hubert,

Post tiom agrablaj kaj sunaj tagoj en S. Benedetto ni pasas la tempon kun sufiĉe da surĉielaj nuboj kaj ofta pluvo kiel kutimas en nia norda regiono de Hispanio.

Tute sincere mi diras al vi ke via pdf-revuo estas home perfekta kaj erarojn mi ne konstatis kaj ne celas konstati.

Ankoraŭ ne ĝuis la tutan enhavon de la broŝuro, sed certe, vi, tagon post tago akiras pli kaj pli da sperto kiel fakulo pli ĵurnalismo. Vere tre plaĉas a mi via informila laboro, kaj eĉ mi ne malbone aspektas en kelkaj fotoj.

**KN17 Daniel MOIRAND Francio (ne venis) 18 Josiane MOIRAND Francio (ne venis)**

Via dokumento, kiu montras la disvolviĝon de la IFEF kongreso en San Benedetto estas rimarkinda ! Ni spektis ĝin de la komenco ĝis la fino kun granda intereso. Ni tie rekonis multajn amikojn-esperantistojn. Kiel vi povis konstati, niaj nomoj troviĝis en la listo de la partoprenantoj : pro familiaj kialoj, ni bedaŭrinde devis rezigni pri la restado en Italio. Feliĉe, danke al via laboro ni tamen kapablis iomete ĉeesti la kongreson kun vi. Dankon, dankegon !

D.& J. Moirand

P.S. Mi forgesis diri al vi, ke jam delonge ni fortrinkis la botelon de "bière d'abbaye", kiun vi kunportis por ni en Les Issambres. Bongustega !

Ĝis revido.



**KN 83 Zuwu HAN Ĉinio 自动回复**

Bone atingis min via retmesaĝo, pro kiu mi dankas vin.

Amike via


Han Zuwu



**KN 106 Jean-Luc TORTEL Francio KN 107 Janine TORTEL Francio**

Tre koran dankon pro via riĉa sendo !

Plej amike Jean-luc & Janine Tortel



**La 30an de Junio**

**48 Jaroslav MATUŠKA Ĉeĥio**

doc. Ing. Jaroslav Matuška, Ph.D. Katedra technologie a řízení dopravy

Dopravní fakulta Jana Pernera Univerzita Pardubice

Studentská 95 53210 Pardubice

tel.: 466036420 (sekretariát: 466036201)

I'm out of office till 2014-07-13. I answer you as soon as possible.


Jaroslav Matuška



**KN30 Liba GABALDA Francio**

Kara Hubert

Jes, mi detale tralegis vian dokumenton kaj trovas ĝin tre interesa kaj bone redaktita kun aldonaj fotoj. Certe vi pasigis multe da tempo pretigante ĝin, do, la rezulto estas perfekta. Gratulon!!! Jes, ankaŭ ni intencas partopreni la venontan IFEF-kongreson en Ĉinio, sed ni ankoraŭ ne esploris eblecojn. Amike, Liba



**La 29an de Junio kaj antaŭaj tagoj**

**KN3 Vito TORNILLO Italio**

Ni interŝanĝis multajn mesaĝojn, kaj Vito sendis multajn fotojn por kompletigi la galerion de (da?) vizaĝoj.

**KN10 Romano BOLOGNESI Italio**

Tre estimataj, karaj samideanoj, mi ĝojas aldoni la lastan numeron de nia "Itala Fervojisto". Bonan legadon. En ĝi estas diverstipaj materialoj, inter kiuj informoj pri la bone sukcesinta 66-a IFEF-Kongreso en San Benedetto del Tronto. Plej amike. Romano Bolognesi



**La 05an de Junio**

**KN3 Vito Tornillo, KN10 Romano Bolognesi, KN32 Gianfranco Tomba**

Karaj gekongresanoj,

certe, ke vi atingis bonorde viajn respektivajn residejojn kunportante memorojn pri la travivitaj tagoj en Italio kaj ĉefe en San Benedetto del Tronto.

Kiel anoncote voĉe al iuj el vi, pri tiuj spertoj ni ŝatus kolekti viajn plej interesajn, kuriozajn, ne kutimajn impresojn kaj bildojn. Ni intencas kunmeti la plej signifajn el ili en memorigan kajeron kaj por tio ni bezonas vian helpon.

Estas eksperimento, kiun, danke al vi, ni provos plenumi laŭ nia eblo kaj gusto.

Atendante viajn reagojn (ne necesas longaj tekstoj, nur kelkaj linioj, telegrafe, kun la plej elstaraj memoraĵoj), ni kore dankas pro via partopreno kaj afableco.

Varme salutas la organizantoj de la 66-a IFK en San Benedetto del Tronto



## La 09an de Julio

*19 Jean RIPOCHE 20 Raymonde RIPOCHE Francio Eo grupo de Nantes*

Karaj Hubert kaj Michèle

Kiamaniere danki vin pro la grava laboro kiun vi faris en tiu programo !!! La laboro estis giganta, bone farita kun pedagogia flanko. Plurfoje mi vidis, revidis la panoramon. Ĉiufoje mi denove vidis pliajn raportojn klikante sur nova ligo. Mi estis tre feliĉa denove eniri la etoson de tiu semajno. Antaŭ niaj okuloj la amikoj paradas laŭ nia pormenta deziro. Ankoraŭ mi sukcesis elŝuti la videobendon de nia gaja kaj sperta akordionisto en Castelfidardo. Dankon Hubert pro via partopreno. Mi multe ŝatas reaŝkulti tiun muzikan eventon faritan de amuza klaŭna artisto.

Ni deziras al vi ambau agrablan someran periodon.

Ĝis, Jean kaj Raymonde



Estos  
daŭrigota...